

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 265

APRIL 2016

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers



LA SABATON 28AN DE MAJO

BONVENON EN MONTIVILLIERS POR NIA ĜENERALA ASEMBLEO !!!

Ĉar de pluraj jaroj, la normanda esperantista kunveno ne okazis en Seine-Maritime, la nordaj normandoj ege ĝojas akcepti vin la 28an de majo en Montivilliers, ĉarma urbeto je dudek kilometroj de Le Havro.

Tiu urbeto estis fondita en la dektria jarcento ĉirkaŭ la abatejo. Rivereto « La Lézarde », kiu trairas ĝin, estis devigita por provizi energion al mueliloj de farunfarejoj kaj tanejoj. Montivilliers riĉiĝis dank'al drapo-komerco sed malprosperis ekde la deksesa jarcento pro la estigo de Le Havro. De kelkaj jardekoj, Montivilliers dediĉas grandan energion al la interurba restrukturiĝo, al urbanismo kaj al turismo. La abatejo, la templo, la atrio de Brisgaret kaj aliaj konstruaĵoj konsistigas riĉan heredaĵon.

Venu la 28an de majo por malkovri tiujn vidindaĵojn !
Kaj nepre partoprenu nian Ĝeneralan Asembleon kies programo estas tre riĉa : konferencoj de Pascal Dubourg Glatigny, el CNRS, fakulo pri arta historio kaj de Abdurahman Junusov kiu nun prelegvojaĝas en Francio, ekspozicio de artaĵoj de nia amiko Alain Chalm, membro de Le Havre grupo.

Jean COLOMBEL



Le 28 mai à Montivilliers
Assemblée Générale
de notre association .

Bulletin d'inscription
page centrale



« C'est une langue construite avec intelligence. Du point de vue linguistique, elle suit vraiment des critères d'économie et d'efficacité qui sont admirables. »

Umberto Eco, écrivain (1932-2016)



ENHAVO

p.1 la vorto de nia kasisto Jean Colombel
p.2 kaj 3 Honore al MUDIE Harold Bolingbroke
p.4 Miŝa en Plouezec ,
la terpomskaraboj (Gigi Sénécal)
encart : plan d' accès à l' A.G
de notre association Espéranto
Normandie à Montivilliers
programme, ordre du jour et inscription.



p.5 Intervjuo de Alain Chalm
p.6 Pascal Dubourg- Glatigny
La lingva demando en la nuntempa arto
p.7 Une conférence à ne pas manquer :
le Daguestan par Junosov
p. 8 La vie des groupes

Honore al MUDIE Harold Bolingbroke (1980-1916)

Jam en la n°260a - novembro 2015 (4a paĝo) de Normanda Esperanto Bulteno, aperis franclingva artikolo kun fotoj pri la unua prezidanto (1908–1916) de Universala Esperanto Asocio, de Brita Esperanto Asocio. (1912–1916) kaj membro de la Lingva Komitato. (Unua nomo de la nuntempa Akademio de Esperanto).

Je la komenco de la Unua Mondmilito, Harold MUDIE aliĝas al la Brita Korpuso kaj estas postenigita ĉe la Centra Soldatejo pri Remonto en Forges-les-Eaux ekde la 10-a oktobro 1914. Li mortis pro aŭtomobila akcidento kun trajno, ĉe traknivela pasejo kaj estis entombigita en la urba tombejo.

La 6an de januaro okazis memorceremonio en la terma stacio FORGES-les-EAUX (76 Seine Maritime – 3.500 enloĝantoj. Urbeto, 50 kilometrojn norde de ROUEN, inter Neufchatel kaj Gournay en Bray).

Por organizi tiun memoran ceremonion, la sekretario de Brita E° Asocio, Tim OWEN kontaktis meze de 2015 Jérôme MOREAU, kiu prizorgas tre interesan Internet-retejon en la franca kaj E°:

<http://herosdeforgesleseaux.free.fr/M/MUDIE%20Harold%20Bolingbroke.htm>

Tie vi povos legi la artikolojn kiuj aperis en la regionaj gazetoj « Paris Normandie » la 04/11/2015, 27/12/2015 antaŭ la ceremonio, kaj raporton la 07/01/2016, kaj en « l'Eclair-la Dépêche » 07/01/2016. Multaj fotoj aperas ankaŭ tie. Mallonga artikolo ankaŭ aperis en la n°65a januaro 2016, de « Esperanto Aktiv' (E° France).

Ni notu ankaŭ ke en « TEJO-Aktuale » n°420a (Junulara sekcio de UEA) aperis artikolo la 15/01/2016 :

« Ceremonio honore al la 1a prezidanto de UEA ».

Tutsame 7 fotojn de Osmo BULLER (Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de Rotterdam – UEA, kiu venis speciale por la ceremonio) kaj mallongan tekston, vi povos trovi, je la 7a de januaro sur la « fejsbuka paĝo » de UEA + foton de Tim OWEN.

facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio

Nia amiko, Patrice DUFEU el Le Havre kiu partoprenis la ceremonion ankaŭ sendis fotojn sur sia propra « Fejsbuka-paĝo ».

Nepre legu la informojn pri H. MUDIE kaj fotojn ĉe paĝoj kiujn verkis Tim OWEN sur retejo :

<http://mudie.eu/eo/>

<http://mudie.eu/eo/memoriga-ceremonio>

Petro QUILLAUD, nome de nia regiona asocio demetis florbukedon sur la tombon, same kiel la brita E° Asocio, la franca « Souvenir Français » kaj stelan kronon nome de la urbestro.

<http://mudie.eu/images/photos/ceremony/anthe ms-2.jpg>



- Inter 80 – 90 personoj venis en la tombejon kun reprezentantoj de la urbestro, de la « Anciens Combattants – Souvenir Français » Gendarmerie, Sapeurs Pompiers, estro de la Harmonie Municipale... (por « Good Save the Queen, La Marseillaise, la Espero »)

- Post la ceremonio, en la urba konferencsalono, ĉeestis la urbestro Michel LEJEUNE, « Conseiller Départemental », membroj de la urba konsilio, sekretario de la urba konsilio kaj almenaŭ 60 personoj + ĵurnalistoj.

- Ni prezentis sur tabloj 80 da diversaj E°libroj kaj dokumentoj. Post enkonduko de Sro BURIN, loka reprezentanto de « Souvenir Français », Tim OWEN Sekretario de Brita E° Asocio iom alparolis la publikon en la franca, por danki la ĉeestantojn.



Michel LEJEUNE
Maire de Forges-les-Eaux
Conseiller Départemental

Tim OWEN
Secrétaire de l'association
britannique d'Espéranto

Colonel Michel BURIN
Président du comité cantonal
du Souvenir Français

Vous prient de bien vouloir honorer de votre présence les cérémonies organisées à Forges les Eaux

MERCREDI 6 JANVIER 2016

à la mémoire du Capitaine de l'armée royale britannique **Harold MUDIE**
décédé à Forges les Eaux le 6 janvier 1916 et inhumé dans le cimetière communal,
1er président de l'association britannique d'Espéranto
1er président de l'association mondiale d'Espéranto



10H00 : Accueil devant la grille du cimetière rue de Neufchâtel (parking)
10h15 : Dépôt de gerbes sur la tombe - Hymnes britannique, Espéranto et français
10h45 : Réception à l'Espace de Forges, rue Francis Fer
11H00 : Conférence sur l'Espéranto et vin d'honneur

- Apresentado de E° kaj de la movado okazis dank'al 40 minuta « PowerPoint »-diapozitivmuntaĵo : Historio de E° - Zamenhof + Kelkaj fotoj dokumentoj + lumbildoj pri rilatoj de UEA kaj Internacia Ruĝa Kruco dum la 1a mondmilito, E° en la militkaptitaj koncentrejoj, E° kaj propagando ĉe la Germanoj kaj Francoj dum la milito, 10a ĝenerala konferenco de Intern. Ruĝa Kruco en Genève kaj rezolucio pri E° (1921) ... Harold MUDIE : 1a Prezidanto de UEA + lia morto en Forges les Eaux la 6an de januaro 1916, kiel kapitano de la Brita armeo ;
- karakterizaĵoj de la lingvo. E° nuntempe. Ni respondis al kelkaj demandoj.
- Honorvino oferita de la urbestro arigis la ĉeestantaron fine de la prelego.
- Vi povos ankaŭ trovi informojn, bildojn kaj fotojn pri Harold MUDIE, ĉe « Vikipedio » senpaga reta enciklopedio :
https://eo.wiki2.org/wiki/Harold_Bolingbroke_Mudie
- Dankon al Tim OWEN, Jérôme MOREAU, Michel LEJEUNE, Michel BURIN, al ĉiuj partoprenantoj por tiu emocia ceremonio.

PETRO LEMARCHAND

Le Pays de Bray

L'ÉCLAIREUR - LA DÉPÊCHE
MERCREDI 13 JANVIER 2016
www.leclaireur-ladepeche.fr

6

CONFERENCE. L'Espéranto, la langue de l'Espérance...

Harold Mudie a été président de l'association mondiale d'Esperanto. Il est enterré au cimetière de Forges-les-Eaux depuis 1916. Son histoire vient d'être rappelée à l'occasion du centenaire de sa mort.

Après avoir honoré la mémoire de Harold Mudie, Tim Owen (secrétaire de la section anglaise de l'Esperanto) et Pierre Lemarchand (secrétaire de l'union normande) ont évoqué l'utilité de pratiquer la langue de l'Esperanto.

Au travers d'une projection d'images, chacun d'eux a fait voyager dans l'histoire de cette langue internationale. Après la commémoration en mémoire d'Harold Mudie, une conférence sur l'esperanto était organisée à Forges.

C'est en 1887, sous le nom de "Lingvo Internacia" (Langue Internationale), que le docteur polonais Ludwik Zamenhof publia son projet de langue construite. Il a utilisé le pseudonyme de Doktoro Esperanto (Docteur qui espère). Dès le début du XXe siècle, cet idiome se répand très vite à travers le monde.

« Chef d'œuvre de logique et simplicité »

Lors de la première guerre mondiale, cette langue assure la correspondance entre prisonniers ou familles séparées des pays belligérants. Les infirmiers de la grande guerre l'utilisent. La Croix Rouge la recommande. À Cassel en 1923, se tient, sous la présidence d'honneur d'Albert Einstein, le IIe congrès de l'Association mondiale (SAT) : la langue de travail est l'esperanto. Quarante-deux savants de l'Académie des sciences émettent la même année un vœu en faveur de son enseignement en tant que « chef-d'œuvre de logique et de simplicité ».

Pour Hitler, l'Esperanto est une langue de « conspiration juive ». Pour Staline, elle est liée au cosmopolitisme bourgeois. L'Esperanto est interdit. Ses partisans sont enfermés dans les camps de concentration.

L'Esperanto à l'école

En ce début de XXIe siècle, la version espérantophone de Wikipédia est lancée. On peut s'inscrire à Esperanto France sur Facebook ou l'apprendre sur Internet (ex <http://esperanto-france.org/>). L'Esperanto peut toujours être enseigné dans nos écoles françaises si les enseignants le souhaitent. Cette langue internationale a pour seule vocation de construire des ponts entre différentes cultures. L'Esperanto ne vise pas à remplacer les langues nationales et régionales. Fondée sur une grammaire simple sans exception, c'est une langue où les mots se combinent pour former un vocabulaire précis. Ces particularités facilitent son apprentissage à tout âge. Michel Burin, président du comité cantonal du Souvenir français concluait cette conférence du 6 janvier par ces mots : « Esperanto : on a tellement besoin d'espérance en ces temps difficiles. »

Pierre Lemarchand et Tim Owen évoquent l'historique de l'Esperanto.

Mi partoprenis lingvan staĝon en Plouezec !

En 2015, **Michèle Chaplain (Miŝa)** por la tra fojo ĉeestis kurson en Plouezec, tre fama esperantista somerstaĝejo en Bretonio. Plouezec, vilaĝo je ses kilometroj de Paimpol, posedas sep kilometran marbordon kun altaj kaj krutaj klifoj. Jen kelkaj eltiraĵoj el ŝia longa kaj entuziasma raporto pri tre interesaj okazintaĵoj.

«Dum mia ne-esperantista edzo Thierry, bicikle vizitadis la regionon kaj sin banis, mi partoprenis unusemajnan staĝon kun 70 aliaj homoj kaj 15 infanoj. La semajno pasis tro rapide dank'al diversaj kaj interesaj kursoj, atelieroj (teatro, kino, origamo, nepala kuirarto, ktp), posttagmeza promenadoj en tiu vizitinda regiono kaj buntaj vesperaj aranĝoj kun prelegoj pri Ukrainio, Nepalo, bretonaj dancoj, infana spektaklo...

Ĉiumatene, mi partoprenis la kurson de Narendra BATTAHARAY, nepala instruisto. Lia edzino, Rajani, estis inter la lernantoj. La unuan tagon, ĉiuj partoprenantoj sin prezentis kaj ĉiutage ni elektis temon por diskuti.

Lunde, Narendra parolis pri Hinduismo (81% el la nepalanoj) kun multaj dioj kaj diinoj.

Li diris, ke "en Nepalo aŭ Katmandu, oni nombras pli da temploj ol hejmoj".

Marde, li montris al ni jagon (saluton al suno, ktp...) kiu tre interesis min.

Merkrede, la temo estis geedziĝa aranĝo. Narendra kaj Rajani, infanaĝe, estis geedze promesitaj unu la alian. Ili aj gepatroj konsultis pastrojn kaj

astrologiistojn kiuj certigis la elekton justa kaj la estontecon feliĉa por la infanoj. La familio serĉis personon samkastan kunsamnivela riĉeco .

Ĵaŭde, Rajani, dum prezento de la lerneja vivo, rakontis anekdoton pri tigro kiu volis eniri la klasĉambron kie ŝi instruis. Ŝi devis firme teni la pordon, poste subite alia tigro alvenis kaj ili atakis unu la alian.

Vendrede, ni parolis pri aliaj religioj (budismo 9% , islamo 4.4% , kristianismo 1.4%).

Rajani ankaŭ legis rakonton pri la tertremo kiun ŝi suferis kun sia patro.

Mi esperas venontjare partopreni la dudekan pluezekan renkontiĝon, eble la lastan ...

Ne maltrafu ĝin !!! »

Miŝa (el la grupo de Flers)



RAJANI, MICHÈLE kaj NARENDRA

LA TERPOMSKARABOJ

Fine de printempo 1946. lun tagon, nia instruistino anoncis : « Hodiaŭ posttagmanĝe, ni iros kolekti la terpomskarabojn ! ». Ĉiuj lernantoj konis tiujn insektojn iom pli dikaj ol kokcineloj vestitaj per striita, verda kaj griza kostumo. (Kutime, inter ni, ni kromnomis la germanajn soldatojn per tiu vorto : terpomskaraboj).

Ĉiu familio, en la kamparo, kultivis sian propran ĝardenon por postvivi tuj post la milito. La terpomoj estis la ĉefaj legomoj kiujn niaj gepatroj kreskigis. Kompreneble, la skaraboj abundis. Ofte, ĉasi ilin estis la tasko de la infanoj.

Por, la lernantoj, tiu devo tute ne signifis tedaĵon sed promeson de longa ludpaŭzo. Neniam ni gimnastikis...krom unu aŭ du semajnon jare kiam la plej aĝaj el ni sin preparis por ekzameno. Alie... la klasĉambro... nur la klasĉambro !

Do, hodiaŭ , surkampa ludpaŭzo ! Ni enviciĝis. Kaj ekiru ni ! Surloke, la instruistino denove nin ansere vicigis kun la plej aĝaj antaŭe. Ŝi disdonis malnovajn skatolojn verŝajne forlasitajn ĉu de la germanaj ĉu de la usonaj soldatoj, ĉie facile troveblaj en nia vilaĝo. Eku la kolektado !

Je la fino de ĉiu terpoma linio, oni nombris la insektojn en ĉiu skatolo. Unu kriis « Tridek, Tridek du !... », alia « Kvardek tri ! ... ». Ĉiuj aplaŭdis... krom ni, la plej junaj. Ni trovis nur, unu, du, tri insektojn kaj neniu laŭdis nin ! Kian maljustecon ! Se ni, la plej junaj, starus kapvice ankaŭ ni trovus multajn kaj la aliaj lernantoj aplaŭdus nin ! Tamen okazis bona posttagmezo sub la libera ĉielo sed nia instruistino bedaŭris : « Ĉiusemajne ni devos reiri sur kampojn ĉar, pro denove eloviĝintaj skaraboj, la folioj estos reinvaditaj ».

Kelkajn semajnon poste : «Hodiaŭ, ni iros surkampen sed bona surprizo atendas vin ».

La « bona surprizo » tia tute aspektis por ni ! Aviadilo, verŝajne helikoptero, superflugis la kampojn kaj pulvorigis ilin per blanka kemiaĵo por mortigi la insektojn. Unue, la flugmaŝino timigis nin ĉar antaŭ unu jaro, aviadiloj bombadis nian vilaĝon. Tuj kiam ni lokalizis unun, ni rapidege ĵetis nin surteren por protekti nin kontraŭ la splitoj.

Hodiaŭ, aviadilo signifas bonan novaĵon sed... ne por ni, kompreneble !

Por ni, la lernantoj : LA LUDPAŬZO ESTIS FINITA !

Gigi SENEAL (14)

Busto de Marianne kaj aliaj talentoj de Alain CHALM

Alain CHALM estas fidela kaj aktiva membro de la havra klubo. Li ankaŭ aktivas en nia regiona asocio kiel buĝetkontrolisto. Kelkfoje li distras nin per bela kanto sed liaj artistaj talentoj multe pli buntas ol tio. Ni intervjuis lin.

Normanda Bulteno : Dum la Ĝenerala Asembleo de Majo 2016, vi prezentos al ni kelkajn el viaj artaĵoj. Rakontu al ni vian karieron.

Alain Chalm : Mi naskiĝis en 1933 en Dunkerko sed dum mia infanaĝo, pro milito kaj sanproblemoj, ankaŭ a loĝis en Etretat kaj Rennes. Post la "Brevet Elémentaire", en 1949 mi eniris horloĝmetilernejon en Besançon en juvelista sekcio dum 4 jaroj. Estis unu el la ŝancoj en mia vivo ĉar tiu metio tute konvenis al miaj kvalitoj. Mi kompletigis miajn konojn dum la militservo en Orléans en aviadarmeo. Tiam mi modifis rapidcirkvitojn en la aviadiloj kaj riparis la horloĝojn de la aviadiloj kaj... de miaj kolegoj. Poste, mi laboris kiel juvelisto en du vendejoj, antaŭ ol malfermi mian propran butikon en 1959 (ĝis 1996) en Le Havre. Mi riparas kaj abunde fabrikis fingroringojn kaj ĉiuspecajn juvelojn, brakoringojn, kolierojn, ktp. Mi inventis maŝinon por skulpti diversformatajn medalojn.

NB : Jes, vi ankaŭ ŝatas meĥanikon kaj vi kolektis DS Citroën aŭtojn. Mi memoras, ke antaŭ multaj jaroj vi promenigis min en unu el viaj DS. Tute nigra kaj tre rimarkinda ĉar estis ĉerkoveturilo. Stranga sperto por vivanto!

AC : Mi ŝatas malmunti motorojn. Por mi, motora paneo estis interesa ĉar mi emas kompreni kaj solvi. Efektive, mi akiris plurajn DS Citroën. Per DS kapoto, mi ornamis mian hejman kamenon.

NB : Ne nur vian kamenon vi konstruis sed ankaŭ vian domon !

AC : Jes, eĉ dufoje ĉar la unua estis komplete detruita pro fajrego.

NB : Kelkaj el viaj artaĵoj estas publike videblaj.

AC : En 1963, kun kolego mi fabrikis la tabernaklan pordon de la preĝejon Sankta Jozefo en Le Havre. Mi antaŭ nelonge renovigis ĝin.

NB : Nepre rakontu al ni vian « Marianne »

AC : De tempo al tempo mi amuziĝas kun iom da speciala tero por skulpti. Mi rimarkis, ke en la urbodomo de nia vilaĝo, Vattetot-sous-Beaumont, ne estis busto de Marianne. Do, el foto de mia edzino mi modlis statuon de Marianne, kiun poste mi gipse muldis kaj blue koloris ĝian vestaĵon. Kiam mi oficiale donis ĝin al la urbestro mi estis akceptita en la honora ĉambro kaj ricevis belan priregionan libron kiel dankon. Dekjarojn poste, la vilaĝestro petis : « Ĉu ci povas pentri ĝin blanke ? ».

« NE, respondis mi, sed mi gipse muldos novan ! ». La unuan statuon, bluestitan, mi donacis al belgaj amikoj kiujn mi regule renkontas en la naturista kampadejo de Yport (cetere, mi eksciis pri esperanto en 1963 dank'al la naturista movado). Ili transdonis ĝin al la « Bourgmestre » de sia urbo ! Tiu-ĉi petis, ke mi iru por oficiale ceremonio en la urba muzeo. Kaj tiel, mia bedaŭrinde ne plu vivanta edzino oficiale eniris Belgion almenaŭ sub formo de busto samrange kiel Brigitte Bardot, Catherine Deneuve, Mireille Mathieu, Michèle Morgan, Sophia Loren kaj aliaj Laetitia Casta por simboli Respublikon kaj la popolan potencon !

NB : Dankon Alain. Dum nia Ĝenerala Asembleo en majo 2016, tre certe multaj partoprenantoj deziros pli scii pri viaj profesiaj kaj artistaj spertoj !



Adhésion-Abonnement 2016

Liste des personnes à jour au 23 mars.

Adele O., Badmington J., Bony P., Bonnet S., Caron S., Chalm A., Colombel J., Cottin B., Dubois A., Dufeu P., Dufresne B., Duval D., Duval E., Etienne P., Ferrand C., Fortin F., Gascoin J., Gibert G., Groult J-C., Gueroult G., J-P., Guilmoit R., Hubert M., Jehenne Ledran N., Jouvin P., Langeois M., Leguillon Decosse H., Lemarchand P., Leprevost A-M., Lesieur A., Levesque C., Loisel A., Longuet J., Magerel J., Marie F., Martial J., Maurau B., Nicolas Y., Paumier M., Quillaud P., Rousseau H., Sauvage J-P., Schertzer J., Senecal G., Sery S., Zilliox P.

Il peut y avoir des oublis si vous avez adhéré ou réadhéré après le 23 mars.

Merci de votre compréhension.

Votre adhésion est INDISPENSABLE POUR LA VIE DE NOTRE ASSOCIATION, merci d' y penser !!

LA LINGVA DEMANDO EN LA NUNTEMPA ARTO

Pascal Dubourg Glatigny lernis esperanton kiam li estis lernanto en Rouen. Pierre Lemarchand instruis lin. Esploristo pri arthistorio ĉe CNRS (franca nacia esplorcentro), Pascal doktoriĝis en 1999 kaj habilitiĝis en 2014. Li instruis art- kaj arkitekturhistorion ĉe universitatoj Paris X-Nanterre, Paris I Panthéon, Sorbonne, Poitiers, Lausanne, ankaŭ en Pretoria kaj Bogota. Li estas aŭtoro de pluraj verkoj kaj redaktinto de artikolkolektoj en la angla, itala, germana kaj franca lingvoj.



Komence de la 20-a jarcento pluraj arttendancoj enkondukas la uzon de la lingvaj elementoj en la bildarton.

Dadaistoj kaj futuristoj, poste surrealistoj, miksas vortojn kun bildoj, ofte cele al politika diskurso. La kunmetado de du tradicie disigitaj artaj

esprimrimedoj ŝuldiĝas parte al la tiama proksimeco de artaj kaj poetaj medioj. Ĉar la celo estas influi la socion, la uzataj lingvoj estas plej ofte lokaj lingvoj.

La futurista manifesto publikiĝas unue en la franca en Parizo (1909) kaj estas poste italgita; kungluaĵoj enmetas eltranĉaĵojn de lokaj gazetoj.

La Gioconda de Marcel Duchamp, renomumita L. H. O. O. Q. (1919) funkcias nur en la franca, la moderna kaj surrealista tipografio de Karel Teige (1927) estas en la ĉeĥa.

Post la dua mondmilito, la uzo de lingvaĵoj plu disvolviĝas.

Streĉa politika situacio nutras la vidartan produktadon. Multaj artistoj prilaboras la lingvan elementon en la arto. En la 60-aj jaroj, popularigo de novaj lingvosciencaj teorioj relanĉas la debaton.

Ĉu la lingvo anstataŭas la artobjektojn kaj ĝis kia grado ĝi estas fidinda. La brita grupo Art and Language (1967 – 1975) prilumis la eblon anstataŭigi la artverkon per lingva diskurso. Ilia ĵurnalo estas fundamenta ŝtono por la t. n. « koncepta arto ». Se la arto esprimiĝas nur perlingve, la ekspozicimaniere komplete ŝanĝiĝas.

En tiu periodo, ne nur evoluas la demando pri la lingvo sed ankaŭ la demando pri kiu lingvo. Internacia cirkulado de artverkoj fariĝas celkonscie planita.

Krom la lokaj lingvoj, uziĝas ankaŭ samgrade la franca kaj la angla, kaj malpli ofte la germana. La slovaka grupo Happsoc (1965, akronimo de evento/feliĉo kun socio/socialismo) posedas angladevenan nomon sed aperigas paralelajn tektojn en la slovaka kaj la franca.

En Okcidento, la uzo de la angla malfermas la pordojn de la artgalerioj kaj de la komerca cirkvito.

En orienta Eŭropo, la angla estas vidata kiel abstrakta sopiro al libera esprimiĝo. Kvankam la franca plu videblas, uzo de la angla fariĝas iom post

iom ĝenerale akceptata perilo de arta komunikado.

En la post 1989-a kunteksto, la fama verko de la serbo-kroata artisto Miladen Stilinović *An artist who cannot speak English is no artist* (1994) aperas provoke sed ne konvinkas.

La uzon de la angla jam ne plu diskuteblas.

Paradokse en la lastaj dudek jaroj multiĝis la artverkoj kiuj utiligas kaj pridiskutas la lingvon Esperanto.

La plej fama artisto ĉe la E-publiko estas Daniel Salomon, kiu disvolvis « postnacion » projekton dum pluraj jaroj (2003 – 2007) sub la nomo « la loko ». Diversaj agadoj engaĝis e-istojn kiel Baldur Ragnarsson. Li priparolis temojn de komprenebla nekomrenata lingvo, de tutmondeco kontraŭ « globalismo ». Lia verko entenas ankaŭ movadajn temojn kiel E-ujan piedpilkan teamon aŭ kreon de zamenhofa monunuo. El Hungario aperis artverkoj kritikaj al E-o. Video-serio kreis Zsolt Asztalos (2011), kiu utiligas E-on kiel lingvon sen kultura fundamento.

Li rigardas ĝin kiel « fikcian, artefaritan » kaj la E-komunumon kiel memvole ekstermondan. En Budapeŝto du svisaj kaj du hungaraj artistoj organizis la eventon Renaissance-Now (2012). En stilo neo-modernisma influita de komiksaj tradicioj, ili ornamis ĉambron per desegnaĵoj akompanataj de E-aj frazoj. La ikonografio rilatis al tiu de realisma socialismo kiel la lingvo E-o « moderna, artefarita sed preskaŭ duonmortinta lingvo kiu aspektas kiel amuz parafrazo (tiel) el la latina ».

Tute alian rilaton al la lingvo havas Willem Boshoff el Sud-Afriko kiu de longe prilaboras la lingvan temon: pri la afrikansa, pri ĉifritaj lingvoj, pri la 11 lingvoj de Sud-Afriko ktp. En lia ekstera instalaĵo Infanoj el la steloj (2009) li disvolvis la temon de la origino de la lingvoj. Serio de granitaj ŝtonoj metaforas la kraŝon de meteorito sur la teron antaŭ 2000 milionoj da jaroj. Tiun eventon li paraleligas kun la biblia rakonto de la Babela turo, kiun li gravuris en kvardeko da lingvoj sur la ŝtonojn.

Esperanto aperas egalrange inter la angla kaj la telega, lingvo el Barato.

Pascal Dubourg Glatigny (prezento en la Kongresa Libro de lia interveno dum UK en Lille).

NOTRE ASSEMBLÉE GÉNÉRALE SE CONCLURA DANS LES MONTAGNES DU DAGUESTAN.

UN VOYAGE A NE PAS MANQUER !!!

Qui mieux qu'Abduraĥman JUNUSOV pourrait nous évoquer le Daguestan, cette république de Russie si particulière par ses cultures, ses multiples langues, sa situation géopolitique ? Abduraĥman a fait des études universitaires de russe, langue et littérature. Toute sa carrière s'est déroulée comme correspondant puis rédacteur en chef des émissions culturelles et artistiques de la Télévision de la République du Daguestan.

Il préside maintenant une association qui édite une revue sur les droits de l'homme dans son pays et participe à ce titre à plusieurs instances nationales. Notre conférencier est aussi un espérantiste de renom. Dès l'apprentissage de

la langue en 1968, il a organisé de nombreuses rencontres en Union Soviétique puis a été à deux reprises président de l'Union Espérantiste de Russie. Il a travaillé pour « Eventoj » et « Monato » de 1994 à 1996 et fait régulièrement des conférences ou des tournées à l'étranger comme celle actuellement organisée pour Espéranto France.

Nous vous garantissons un exposé de grande qualité qui avait déjà eu beaucoup de succès lors d'une première tournée de conférences en 2002.



LA VIE DES GROUPES



Hérouville-Saint-Clair

Tous les cours ont lieu le mardi.

Otilia, une lycéenne, qui a commencé le cours en octobre (assuré par Gigi Sénécal et Claude Ferrand) a atteint un niveau suffisant pour rejoindre le cours intermédiaire de Gérard Sénécal. Il regroupe 4 élèves.

Le cours de conversation réunit, selon les semaines, de 10 à 16 personnes.

Son programme est fixé pour chaque trimestre et est animé à tour de rôle par le plus grand nombre possible de participants. Gérard Sénécal et Jean-Pierre Sauvage ont été interviewés pendant une heure en mars par une radio locale «TSF 98 ».

Yves Nicolas



Manche (Granville-Coutances)

3 élèves au cours de premier degré et à celui du second degré et un « babilrondo » mensuel à Coutances. Jacqueline Guillemet a accueilli le 21 janvier une dizaine de personnes à l'Espace Jeunes de Coutances pour le prelego de Yves Nicolas sur son voyage en Iran. Odile et Philippe Bony ont traduit en français une plaquette d'initiation à l'espéranto de neuf pages de leur ami allemand Klauss Frieze à destination des enfants. Philippe a assuré un cours dans son ancien lycée. Annick Besneville, Françoise Glémot et Christian comptent participer au stage de Plouezec. Le groupe réfléchit à l'organisation d'une visite de Granville au début de l'automne pour les espérantistes normands.

Christian Levesque.

La vie des groupes (suite)

ROUEN

3 nouveaux élèves et deux élèves de l'an dernier. Le cours est une adaptation des 10 leçons du site « Ikurso » et d'exercices de « edukado.net » pour des points particuliers de grammaire. Pour les exemples concrets de conversation, utilisation de vidéos du cours « Pasporto al la tuta mondo » qu'on trouve sur Youtube. Le cours a lieu normalement le mercredi soir et devrait se terminer fin avril.

Matthieu Lecesne.

Le Havre

Pas de nouveaux élèves cette année. Le cours hebdomadaire du jeudi soir s'adresse donc à des progressants. Nous diversifions nos supports d'animation en nous inspirant de sites académiques ou en adaptant des jeux de société. Une page Facebook est consultable sur la Toile "Havre Esperanto". Notre « Gvidilo.net » reste à la disposition des espérantophones qui allient tourisme et esperanto. Jean Colombel, que nous épaulons de notre mieux, prépare activement l'Assemblée Générale normande qui se déroulera dans sa commune. Le groupe normand sera très heureux de vous accueillir. Bonvenon ĉe ni !

Sylvie Caron



ZEF et SAEED

FLERS

5 personnes participent au cours du mercredi qui a lieu dans le Réseau d'Echanges Réciproques de Savoirs (Association de Solidarité avec Tous les Immigrés) à la Maison d'activités Emile Halbout. Au programme : chansons, lecture d'articles du « Normanda Bulteno » et de « Esperanto Info », Cours Rationnel Nous écrivons collectivement nos articles pour le bulletin. Fin mars, trois personnes ont assisté au Mans à la conférence de Saeed, un pakistanaï en tournée en France. Séquence émotion, dont nous vous parlerons en détail dans le bulletin de septembre !

Anne-Marie Leprévost

UN PROGRAMME EPATANT A GRESILLON !

12-17 junio : « La Luaro laŭ fluo de la vortoj. Gloraj verkistoj kaj la kasteloj de La Luaro ». Vizitoj kaj konferencoj.

04-15 julio : Dektaga Esperanto-kurso kun Christian Rivière. La romano " Les heures souterraines " de Delphine de Vigan.

06-13-15 aŭgusto : SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno kun 5 famaj instruistoj (inter ili Mikaelo Bronŝtejn). Niveloj : A1/A2, B1, B2, C1. Kantos la tre talentaj « Jomart kaj Nataŝa ». Opcia ekskurso.


21-28 aŭgusto : Festa Semajno por infanoj kaj familioj, por prepari la novan lernejon



kastelo@gresillon.org

Esperanto-Kastelo
St-Martin d'Arcé
49 150 Baugé en Anjou.
02 41 89 10 34

Salle Saint Louis 1 rue Albert Lecarpentier **Montivilliers**
n° 5



En arrivant vers Montivilliers - *ne pas prendre Montivilliers centre* - prendre Montivilliers zone d'activités.

ĠIS BALDAŮ !

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE à MONTIVILLIERS le Samedi 28 Mai 2016

Programme

09h45 Accueil salle Saint Louis

10h15 Conférence de Pascal Dubourg Glatigny : la question linguistique dans l'art actuel

12h30 Repas (Nous nous régalerons avec les plats et les boissons que les participants apporteront)

14h Assemblée Générale

16h Pause et visite de l'aître de Brisgaret

17h30 Conférence de Abdurahman Junusov sur le Daguestan

19h00 Dîner au restaurant (15€+ boissons)

Ordre du jour de l' A.G

Rapports moral et financier

Le Bulletin Normand

Renouvellement du Conseil d' Administration

Actions locales et projets

ĜENERALA ASEMBLEO en MONTIVILLIERS la SABATON 28an de MAJO 2016

PROGRAMO

09.45 Akcepto en salle St Louis

10.15 Prelego de Pascal Dubourg Glatigny : La lingva demando en la nuntempa arto

12.30 Tagmanĝo (Ni kune frandos pladojn kaj trinkaĵojn kiujn la partoprenantoj alportos)

14.00 Ĝenerala Asembleo

16.00 Paŭzo kaj vizitado de la aĵtro de Brisgaret

17h30 Prelego de Abdurahman Junusov pri la Dagestano

19h00 Vespermanĝo en restoracio(15€+trinkaĵoj)

Tagordo de la ĜENERALA. ASEMBLEO.

Morala kaj financa raporto

Normanda Bulteno

Renovigo de la estraro

Lokaj agadoj kaj projektoj



Merci de renvoyer le coupon-réponse avant le 7 mai

Bonvolu resendi tiun respondilon antaŭ la 7a de majo

al Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76290 Montivilliers aŭ <jean-j.colombel@laposte.net>

Nomo.....propra nomo.....

Adreso.....

Telefono.....

Retadreso.....@.....

Vespermanĝo en restoracio : 15 € + trinkaĵoj.

JES

NE

(entourez « jes » ou « ne » selon votre choix)